

=65,00 M-6294 F-15631

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 - 29 andar - Tel. 232-6309 20.211 - RIO DE JANEIRO - BRASIL

Pessoa, el Santarem, estis fondita la 26-an de

Esperanto" (Av. D. Frederico Costa, 785 - Praimina)

kzemploj! Ni nur esperas,ke baldeŭ la ticaj samideanoj amase

gulajn kunvenojn ĉe "Casa de Cultura de Santamen".



IMPRESSO

DEMOKRATIA MOMENTO

Laŭ la 8a. artikolo de la statuto de BEL, du foje jare, devas okazi Ordinaraj Ĝeneralaj Kunsidoj.

Kutime, tiuj Kunsidoj ĉiam karakteriziĝas per demokratia kaj libera diskutado de la problemoj de BEL kaj de la e-a movado, ĝenerale.

Jen, denove, alvenis tiu momento! La 20-an de oktobro, sabaton, je la 4-a ptm, okazos la Dua Ĝenerala Kunsido de tiu ĉi jaro. Interalie, estis fiksitaj por la tagordo la jenaj temoj:

- 1. Financa raporto rilate al 1983.
- 2. Bugeto por 1985.
- 3. Čeneralaj temoj.

Sed, antaŭ la malfermo de la kunsido, de la 3-a ĝis la 4-a; la ĉefdelegito de UEA en nia lando, S-ro Ivon Barbosa, el Bauru, SP, prelegos pri la temo "Delegita Reto de UEA en Brazilo".

Do, ni invitas al ĉiuj nepre ĉeesti tiun Kunsidon!

NOVAJOJ PRI BEL NOVAJOJ PRI BEL

DONACOJ AL BEL, EN SEPTEMBRO - Antonio Rodrigues da Silva: Cr\$ 2.000,00. Koran Dankon!
DIPLOMOJ LIVERITAJ, EN SEPTEMBRO - 3 bazaj kaj 8 progresigaj.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ - 7 fakturoj; 77 enspeznotoj; 33 leteroj; 3 rembursaj enspeznotoj.
ALIĜOJ/ABONOJ - al UEA: 1; al EL POPOLA ĈINIO: 1.

BEL-MEMBRARO/Stato je la 30-a de septembro

	MS						
the ce so fi		<u>M-1</u>	<u>M</u> −2	DM	BM	Entute	
Gis 30/08/84	238	139	20	30	04	431	
En septembro	31	4	3	2	ODTE I	40	
Gis 30/09/84	269	143	23	32	04	471	
Ĝis 31/12/83	288	135	23	30	02	478	

OFICISTO DE BEL GAJNAS LITERATURAN PREMION - La unuan lokon en la "Concurso José Olympio/ 1983" estis aljugita al nia oficisto Ronaldo Alves de Oliveira pro la verko "Martim Cerere Revisitado" kiu bazigas en la verkaro de la brazila aŭtoro Cassiano Ricardo. Baldaŭ, aperos libroforme la tri plej bonaj verkoj premiitaj en tiu Konkurso.

VIGLA AGADO EN LA NORDA REGIONO

Dumlonge, oni ricevis sporadajn informojn pri la e-a movado en la nordo de Brazilo. Ni nur sciis pri la ekzisto de izolitaj esperantistoj tie kaj de iu mistera kurso de e-o en la Federacia Universitato de Pará.

Tamen, antaŭ pli malpli kvin jaroj, la panoramo ekŝanĝiĝis: refunkciis malnova klubo en Belém (Klubo Esperantista Zamenhof), okazis amasa instruado de e-o en Manaus kaj la fondo de novaj asocioj en diversaj ŝtatoj de la regiono (Amazonas, Acre, Rondônia, Amapa kaj aliaj). Sekvis eldono de komuna bulteno (Hileo) kaj la publikigo de "Amazonia Esperantista Adresaro", kun ĉirkaŭ 70 adre soj en 20 urboj de tiu regiono.

Kaj, nun, denove, venas aliaj freŝaj novaĵoj de la tiea movado:

- Sub la aŭspicio de Klubo Esperantista Zamenhof (Caixa Postal 2012, Belém, Pará), aperis la unua volumo de Kultura Kajero, sub la titolo "Historio de Klubo Esperantista Zamenhof kaj de Esperanto en Pará" kaj nova numero (julia/aŭgusta) de "La Verda Papago", la oficiala organo de KEZ.
- Unu el la plej prestiĝaj ĵurnaloj de Belém A Provincia do Pará publikigas regule rubrikon pri e-o, sub la respondeco de nia S-ano Alberto Milhomens.
- Laŭ informo de S-ano Valdenir Araujo Pessoa, el Santarém, estis fondita la 26-an de majo de la kuranta jaro "Associação Santarena de Esperanto" (Av. D.Frederico Costa, 785 Prainha) kiu jam havas 20 membrojn kaj okazigas regulajn kunvenojn ĉe "Casa de Cultura de Santarém".

Jen instigaj kaj sekvindaj ekzemploj! Ni nur esperas, ke baldaŭ la tieaj samideanoj amase aliĝos al BEL kaj tiamaniere ankaŭ fortikigos nian enlandan movadon!

MALIONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE ... PRI LA BRAZILA

REAPERIS "SUDA STELO" - "Post mallonga vintrodormo, revenas hodiaŭ al al brazila esperantista medio la oficiala informa organo de la gaŭĉa movado". Tiel komenciĝas enkonduka artikolo ĉe Suda Stelo sep/84, sub la respondeco de S-ano Ivo Sanguinetti.

"ANTAŬEN" INFORMAS PRI SANTA CATARINA - Interesaj artikoloj kaj informoj pri la movado en Santa Catarina aperas en la septembra numero de "Antaŭen", la oficiala organo de Esperantista Asocio de Santa Catarina (Caixa Postal, 460, Florianopolis, SC). Interalie, ĝi sciigas nin, ke ekde 1981, estis liveritaj de tiu Asocio 65 diplomoj en diversaj niveloj. Krome, estas ankaŭ informo pri okazigo de sukcesinta intensiva kurso de e-o en la urbo Joinville kie estis fondita iu Bicikla Klubo kiu portas la nomon "Esperanto", omaĝe al la internacia lingvo.

EN BAHIA, I REGIONA RENKONTIĈO DE E-O - okazos en Cruz das Almas (130km for de Salvador), de la 13-a gis la 14-a de oktobro, sub la respondeco de Societo Esperanta de Salvador "kun la sola celo interfratigi la esperantistojn profite al la disvastigado de la Lingvo Internacia, en Bahia", kiel informas sendita prospekto. La ceftemo de la Renkontigo estos "La Komunikado kaj Esperanto". Pliaj informoj: Rua Conselheiro Spinola, 57, Barris, 40.000-SALVADOR.

ESPERANTO EN MILITISTA KOLEGIO DE RIO DE JANEIRO - Sub la auspicio de "Circulo de Pais e Mestres do CMRJ" okazas, ekde la 13-a de sep., Kurso de E-o por lemantoj de la unuagrada nivelo (6a., 7a. kaj 8a. serioj), gvidita de S-ano Sylvio Malheiros, kiu, de 1980, regule laboras por la internacia lingvo en tiu Kolegio.

KURSO DE ESPERANTO ĈE PROFESIA LERNEJO DE ACESITA - Laŭ informo de S-ano Adonis M.S. Silva, (Caixa Postal, 192, 35180-ACESITA, MG), en oktobro, li gvidos bazan kurson de e-o ĉe Profesia Lernejo de Acesita.

GRAVA RAPORTO PRI ESPERANTO EN REVUO "IEGENDA" - Tripaĝa ampleksa raporto pri la internacia lingvo, krom ankaŭ titolo pri tiu raporto sur la kovrilo, aperis en la revuo "Iegenda" kiu cirkulas inter gravaj entrepreno-gvidantoj kaj bankdirektoroj.

LA MOVADO EN CAMPINAS ESTAS ĈE UNIVERSITATOJ - Laŭ informo de S-ano João Manoel Aguilera Jr. (R.Proença 866 apto 12, 13.100-CAMPINAS, SP), funkcias, nuntempe, en tiu urbo, kursoj de e-o en du universitatoj: la Katolika kaj UNICAMP. Krome, la 15-an de septembro la tieaj esperantistoj kunvenis cele al la revivigo de "Kampinas E-o Interligo".

KURSO DE ESPERANTO ĈE "FEDERACIA CENTRO PRI TEKNOLOGIA EDUKADO DE RIO DE JANEIRO" - Danke al prelego farita en aŭgusto antaŭ rotarianoj, S-ano José Rabello de Paula estis invitita organizi kurson de e-o por lemantoj de "Centro Federal de Educação Tecnológico do Rio de Janeiro". La kurso komenciĝos en oktobro kaj estas malfermita ankaŭ por la ĝenerala publiko.

BRAZILJA ESPERANTO-ASOCIO AKIRAS PROPRAN SIDEJON - Laŭ informo aperinta en "Tagiĝo/aŭg 84", Associação Brasiliense de E-o" akiris propran sidejon danke al parto de la profito de la 66-a Universala E-o Kongreso".

KVARDEK DU NOVAJ ESPERANTISTOJ - Laŭ "Informilo nº 3/84", Departemento de Esperanto de la Spiritista Unuigo de Minas Cerais liveris 42 diplomojn al la kursfinintoj de la unua semestro de 1984 de la esperantaj kursoj aŭspiciitaj de tiu Organizaĵo.